

Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj

Claude Gacond, 331-a radioprelego, 1970.02.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni donis al vi ĝeneralajn informojn pri la graveco de la analiza metodo nomata **programado**. La pasintan semajnon ni provis montri al vi, kiel programisto analizas studtemon. Vi povis konstati, ke li devas dediĉi multe da tempo por serĉi precizan difinon de la lernobjekto. Poste vi vidis, ke li verkas teston. Testato, kiu ĝin sukcese trapasus, ne bezonus studi la koncernan ĉapitron.

A.- Vi rimarkis poste, ke la programisto havas metodon por malkovri la refleksojn, kiujn la lernantoj devos akiri por sukcesi je tiu testo. Tiu etapo de la programado nomiĝas inventario de la lernrefleksoj.

Cl.- Fine vi konstatis, ke diagramo permesas trovi, en kia vico devos sin sekvi la demandoj kaj respondoj, por ke la lernantoj facile asimilu la lernobjekton. Bedaŭrinde ni ne povis montri al vi unu el tiuj diagramoj. Ili similas al arbo, kies trunko estus supre kaj la branĉoj sube.

A.- Vi certe demandas vin, kiom da tempo estas necesa por verki unu ĉapitron de lernolibro laŭ tiu analiz-tekniko **programado**. Ni povis kalkuli, ke ĉapitro, kiun meza lernanto devas studi dum unu horo, almenaŭ estas frukto de cent ĝis ducent analiz-horoj. Pro tio programitaj kursoj ne abundas. Sed pro tio ili ĝenerale estas pli bonaj ol samobjektaj lernolibroj.

Cl.- Por konkludi tiun prelegserion pri programado ni diros kelkajn vortojn pri la nun redaktata *Elementa kurso de esperanto por franclingvanoj*.

A.- Jam aperis multobligite en provizora eldono la kvar unuaj ĉapitroj. La unua instruas pri la substantivo, artikolo kaj pluralo. Unue la lernantoj trovas teston. Se ili ĝin sukcese trapasas, ili tuj iras al la demando 17-a, kiu instruas pri la substantiva finiĝo **o**. La malsukcesintoj ricevas informojn pri la lernobjekto substantivo.

Cl.- La samo okazas por la artikolo. Testo konkludas tiun ĉapitron. La lernantoj devas ĝin sendi por ricevi la duan ĉapitron. Tiel la kurs-programisto povas kontroli la efikecon de la kurso. La unua ĉapitro, kiu estas je sia tria reverko, montriĝis efika. Tial ĝi baldaŭ povos esti presita en definitiva formo.

A.- Tiam la kursanoj ricevos kajereton. En ĝi ili trovos ĝeneralajn informojn pri esperanto en la franca lingvo kaj tiun unuan ĉapitron. La informoj pri esperanto estos instigilo lerni la lingvon. Tiel tiu broŝuro okpaĝa povos esti uzata kiel varbilo al esperanto kaj al la programita kurso.

Cl.- La dua ĉapitro komenciĝas per vorto-listo. Poste sekvas instruo pri la as-tempo, ankaŭ testo konkludas tiun ĉapitron, kies verkado ne ankoraŭ estas definitiva. Ĝis nun ĝi montriĝis efika. Ĝi aperos en broŝuro, kie informado pri esperanto estos daŭrigata. Aperos facilaj tekstoj, kiuj akompanos humuraĵojn.

A.- La tria ĉapitro instruas pri la sufikso **-in**, pri la prefikso **bo-**, kaj alportas multajn novajn radikojn. Post kelkaj plibonigoj ĝi formos trian broŝuron, en kiu la esperantaj tekstoj iom post iom anstataŭos la tekstojn en la lingvo franca.

Cl.- La kvara ĉapitro instruas pri la adjektivo, la radikoj kaj la prefikso **mal-**. Ĝi aperos en broŝuro, kie la franca lingvo preskaŭ komplete forestos.

A.- Ni nun laboras al la programado de la gramatika parto de tiu kurso. Kiam la tuta gramatika parto estos preta, ni aldonos tekstojn, kies malfacilaĵo estos kalkulita.

Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj

Claude Gacond, 331-a radioprelego, 1970.02.11 & 14

Cl.- La kvina ĉapitro estas nun kritikata de fakuloj. Ĝi baldaŭ estos multobligita kaj dissendita al la gelernantoj, kiuj ĝin atendas. por ĝin eksperimente trastudi.

A.- Tiu ĉapitro instruas pri la komparativo, pri la infinitivo kaj pri la adverboj.

Cl.- Programita kurso instruas per demandoj kaj respondoj. Jen parto dediĉita al la komparativo :

A.- **Informoj** : En la ĉielo brilas steloj kaj planedoj.

Cl.- Suno estas stelo.

A.- Luno, Venuso, Jupitero estas planedoj.

Cl.- La planedo Luno estas la satelito de la planedo Tero.

A.- La planedoj Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano kaj Neptuno estas satelitoj de la stelo Suno.

Cl.- Suno estas pli granda ol Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Luno.

A.- Luno estas malpli granda ol Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Suno.

Cl.- Tero estas pli granda ol Merkuro, Venuso, Marso kaj Luno.

A.- Tero estas malpli granda ol Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Suno.

Cl.- **Demando** : Ĉu Luno estas malpli granda ol Tero ?

A.- La lernantoj, por respondi, devas atente ekzameni la frazojn, kiujn vi ĵus aŭdis. Poste ili skribu respondos :

Cl.- Jes, Luno estas malpli granda ol Tero.

A.- Tiam ili tiras suben kovr-folion, kaj ili malkovras la respondon.

Cl.- Jes, Luno estas malpli granda ol Tero.

A.- Ili kontrolas la ekzaktecon de sia respondo. Ekzamenante la laborojn de la eksperimentaj gelernantoj, ni povis konstati, ke ili estas ege severaj kontraŭ si mem. Apud la respondo ili trovas novan demandon :

Cl.- Ĉu Merkuro estas pli granda ol Tero ?

A.- Ofte por respondi ili devas relegi la informojn. Kaj ili respondos :

Cl.- Ne, Merkuro estas malpli granda ol Tero.

A.- Tiam ili ree subentiras la kovr-folion kaj malkovras la respondon.

Cl.- Ne, Merkuro estas malpli granda ol Tero. Aŭ : Ne, Merkuro estas pli malgranda ol Tero.

A.- Tiel, tute trankvile, plej eble per esperanto, kelkfoje kun tradukekzercoj, ili akiras novajn vortojn kaj la lernobjekton. Unuanime la gelernantoj ŝatas la programitajn kursojn. Sed ni evitos tro diskonigi tiun kurson antaŭ ol ni estos havintaj la tempon ĝin komplete verki.

Cl.- Sed poste ni uzos modernajn propagand-metodojn por ĝin disvastigi.

A.- Se vi komprenas la francan lingvon kaj ŝatus eksperimenti tiun kurson por povi alporti vian vidpunkton de spertulo, vi povas skribi al Radio-Svislando. Tiam vi ricevos la unuan

Elementa kurso de esperanto programita por francilingvanoj

Claude Gacond, 331-a radioprelego, 1970.02.11 & 14

lecionon, kaj se vi resendos la teston, vi sisteme ricevos la sekvajn ĉapitrojn. Kiel esperantistoj vi eble povos alporti taŭgajn kritikojn, kiuj povos influi la definitivan eldonon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-